

Pri la svisa neŭtraleco
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.12.14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

La 22-a de oktobro 1991 estis historia tago en Svislando. Okaze de la eksubskribo de la kontrakto, kiu unuigos en vasta Eŭropa Ekonomia Spaco la landojn de Asocio Eŭropa de Libera Ekonomia al tiuj de Eŭropa Komunumo, la svisa ministro pri eksteraj aferoj, federacia konsilanto René Felber, anoncis nome de la svisa registaro, ke Svislando intencas aliĝi al Eŭropa Komunumo. En Svislando mem tiu anonco kaŭzis multajn pozitivajn reagojn, verŝajne pli ol antaŭvidite, eĉ se kelkaj proklamis, ke tiu aliĝo estus kontraŭa al la principo de la svisa neŭtraleco.

A.- Koncerne tiun svisan neŭtralecon ni konstatas, ke ĝi estas laŭdata aŭ kritikata de la svisoj mem kaj ekster Svislando, ne laŭ ties efiko, sed laŭ la profitoj aŭ malhelpoj, kiujn ĝi kaŭzas. Okaze de konflikto internacia, la batalantaj registaroj laŭdas la neŭtralan Svislandon, se tiu neŭtraleco signifas por ili ian helpon, sed tuj kiam ĝi baras al ili militvojon, ili provas pruvi, ke ĝi estas kondamninda. Tiam la svisoj fariĝas aĉaj profitantoj. Alvenas militpaŭzo kaj bezono je renkontiĝejo sur neŭtrala teritorio, tiam laŭdoj al la homama rolo de Svislando anstataŭas la kritikojn. Ĉiu ŝatas priskribi, kio devus esti la svisa neŭtraleco laŭ la propra momenta bezono.

Cl.- Sed tio ne malhelpas la svisan federacian registaron, kiun la svisoj nomas Federacia Konsilantaro, havi propran kondumlinon. Ĝus post la dua mondmilito federacia konsilanto Petitpierre difinis tiun kondumlinon per la sekva formulo: "Neŭtraleco kaj solidareco". Li volis komprenigi, ke la svisa neŭtraleco neniel estas pasiva retiriĝo for de la internaciaj problemoj. Ĝi estas proklamo konstanta, ke ne armiloj kaj perfortemo, sed arbitracio kaj kunlaboremo kondukas al paco kaj progresoj.

A.- Estus bone foje raporti, kiel naskiĝis la nocio mem de tiu aktiva neŭtraleco, kiu fariĝis kun la federacia idealo unu el la karakterizaĵoj de la svisa politiko.

Cl.- Tiun ĉi jaron Svislando celebradis la sepcentan jariĝon de la ĉarto de 1291, kiu unuigis en tri-ŝtata ligo la kamparanajn civitojn Uri, Schwyz kaj Nidwald. Tiu alianco daŭris, ĉar ĝi iniciatis por ĉiam juran manieron por arbitracii la interŝtatajn konfliktojn. Kaj dum tiuj arbitraciaj procesoj alvenis iom post iom la ideo, ke iuj aliancanoj devus resti neŭtralaj por povi pli objektivite plenumi la rolon de arbitraciantoj kaj repacigantoj, kiam konfliktoj dividas la kunfederaciitojn.

A.- Estas interese trastudi kelkajn tiajn konfliktojn, kiuj kondukis al la nocio de neŭtraleco. Tion ni faros en serio da elsendoj, kiujn ni kopiigos sur kasedo, kiun interesatoj povos mendi al Svisa Radio Internacia.

Cl.- La unua malkovro de la ĵus citita tri-ŝtata ligo Uri, Schwyz kaj Nidwald estas speco de vakcino kontraŭ la viruso de la naciismo. Ni komencu raportante pri tiu tre grava malkovro:

A.- Dum la 13-a jarcento kun la monhelpo de la imperiestra povo la Uri-anoj konstruis straton en la Gotarda pasejo. Tial ilia civito fariĝis ekonomie kaj strategie potenca. Ĝuste samtempe la imperiestra povo malfortiĝis. Mankis eĉ imperiestro dum 17 jaroj je la kapo de Sankta Imperio Romia Germana.

Cl.- Tiuepoke okazis en la ŝtato Uri interklana konflikto kun repaciga interveno de la feŭda mastro Grafo de Habsburg, kiu profitis la okazon por fortikigi sian pozicion de reganto. Saĝe la Uri-anoj decidis, ke estontece ili solvos mem tiajn konfliktojn por malebligi la intervenon de la feŭda mastro. Ili akceptis tiucele ĉarton, kiu diris interalie: ke "okaze de gravaj konfliktoj inter individuoj, eminentuloj tuj devos sin intermeti kaj labori por repacigi la partiojn."

A.- En 1270 ilia feŭda mastro grafo Rodolfo de Habsburg estis elektita imperiestro. La tri alpaj civitoj Uri, Schwyz kaj Nidwald sin esprimis kontraŭ tiu elekto, ĉar estis al ili malagrabla, ke ilia feŭda mastro fariĝu imperiestro. Tio perdis al ili apelacian eblon okaze de konflikto. Ili sentis la neceson fari sekretan pakton de komuna defendo kontraŭ tiu jura danĝero. Ni scias, ke en ĝi paragrafo reprenis la decidon de la ĉarto de Uri, sed ĝi ne plu rilatis al konfliktoj inter civitanoj, sed inter la civitoj mem. "Okaze de konflikto inter du ŝtatoj, la tria ŝtato devos aŭtomate interveni kiel arbitracianto. Kaj se unu el la konfliktantoj ne akceptos tiun arbitracion, la tria ŝtato devos militi kontraŭ ĝi apud la konfliktanto, kiu akceptis la arbitracion."

Cl.- Tiu alianco signifis fakte cedon de parto de la propra suvereneco profite al la tuto, profite al la ligo inter la tri civitoj egalrajtaj kaj egalfortaj. Ĝi signifis perdon de la rajto mem juĝi la propran kaŭzon. En la pakto estis neniam templimigo. Ni scias, ke dum la unua jarcento de la ligo pli ol 200 konfliktoj estis submetitaj al tiu tipo de arbitracio. Tial la imperiestro Rodolfo de Habsburg kaj liaj posteuloj ne havis plu realan kaŭzon por interveni kiel repacigantoj. De 1270 ĝis nun fakte neniam okazis armita konflikto inter tiuj tri ŝtatoj Uri, Schwyz kaj Nidwald. Tio estas historia unikaĵo. Tiuj tri civitoj faris grandan malkovron.

A.- Kiel ni jam diris, ili malkovris specon de vakcino kontraŭ la viruso de la naciismo. En 1919 la ĵus kreita Ligo de Nacioj rifuzis uzi ĉi tiun vakcinon. La alianciĝintaj ŝtatoj restis memjuĝantoj pri la propraj kaŭzoj okaze de konfliktoj. Pro tio ili ne kapablis solvi la internaciajn konfliktojn. Tial la vivo de Ligo de Nacioj daŭris apenaŭ dudek jarojn. Bedaŭrinde Unuiĝinta Naciaro heredis tiun nekontentigan situacion. Ĉiu ŝtatomembro restas memjuĝanto pri la propraj kaŭzoj. Nur malrapide la granduloj devigas al arbitracio la etulojn. Eŭropa Komunumo iris pli saĝan vojon. Superŝtataj instancoj organizas la interŝtatan kunvivadon kaj okaze de konfliktoj la registaroj devas submetiĝi al la juĝo de tribunala kortumo. Kiel la tri-ŝtata ligo Uri, Schwyz kaj Nidwald, la 6-ŝtata Eŭropa Komunumo, kiu unuigis en la kvindekaj jaroj Germanion, Francion, Italion kaj Benelukson, fariĝis altira centro. La svisa ligo kreskis al nuna: 26-ŝtata federacio, kaj la Eŭropa Komunumo estas nun jam 12-ŝtata kaj ĉiuj antaŭvidas, ke foje ĝi etendiĝos al tuta Eŭropo. Ambaŭ eksperimentas vakcinadon kontraŭ la viruso de la naciismo, situacion en kiu la ŝtatoj rezignas mem juĝi la propran kaŭzon. Ili cedis parton de sia suvereneco profite al jure difinita packonstruo. Jam nun Svislando vole nevole estas submetita al la jura konstruo de Eŭropa Komunumo, kiel en mezepoko pli kaj pli la najbaroj de Uri, Schwyz kaj Nidwald sentis sin iel koncernataj de la juraj reguloj, kiujn la tri-ŝtata ligo iniciatis.

Cl.- Kiel ni konstato la venontan semajnon, dua malkovro kondukos al la nocio de neŭtraleco.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree Gacond diras: Ĝis reaŭdo !